



40a jaro. Nro 92a. 2a semestro 2013

VENEZUELA STELO

Organo de Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451



Venezuela Esperanto-Asocio 2013

La Insulo de Nemo (X)

Fotoraportajo: El Fortín de La Galera

Eksterteranoj ankaŭ scias pri Esperanto

La 21-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo



Enhavtabelo

Movadaj Noticoj 3a

La 21-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo
Liba Gabalda 8a

La Insulo de Nemo (X)
Johano Negrete 10a

La Eldevigo
Ricardo Coutinho 13a

Antaŭjuĝo
Sire Pérez 14a

Fotoraportaĵo: Fortín de La Galera
Ricardo Coutinho 15a

Recenzo: Eksterteranoj ankaŭ scias pri Esperanto
Johano Negrete 19a

Pri plurismo, nihilismo kaj Budhismo
Ramón Morales Castel 21a

Les presentamos nuestra nueva sección fija de la revista con información en español sobre el Movimiento Esperantista en el mundo:

Directorio de Asociaciones en América 22

Esperanto: Movimiento internacional 23

¿Quieres saber más sobre el Esperanto?

El Esperanto es un idioma planificado, creado en 1887 para servir como idioma neutral internacional. Su gramática sencilla facilita su dominio rápido. Su flexibilidad lo convierte en una lengua ideal para la traducción y la creación literaria. Si quieres saber más sobre este idioma fascinante, escribe o dirígete a la Asociación Venezolana de Esperanto.

Venezuela Stelo es el órgano difusor oficial de la **Asociación Venezolana de Esperanto**. Esta revista está totalmente escrita en esperanto, conteniendo artículos de interés nacional e internacional.

Para saber más visita: www.esperanto-venezuela.org
Y también el Directorio en las páginas 22 y 23 de esta revista.



VENEZUELA STELO
Órgano de la Venezuela Esperanto-Asocio

VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.
Telefonnumero: 58-0212.662.9224
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net



AVE
Asociación Venezolana de Esperanto
Venezuela Esperanto-Asocio

Estraranoj:

Prezidanto: Johano Negrete.
Vic-Prezidanto: Juan Miranda.
Sekretario: Ricardo Coutinho.
Kasistino: Elizabeth Miranda.

Aldelegitoj:

Esteban Mosonyi
(Konferencoj kaj Interinstituciaj Rilatoj).
Nancy Aquino (Eldonado).
Aquiles Rivas (Biblioteko).
Silvana Messori (Instruado).

Redakcia Responsulo:

Ricardo Coutinho.

Kunlaborantoj:

Liba Gabalda.
Johano Negrete.
Ramón Morales Castel.
Thairon Martínez.

Grafikisto: Ramón Morales Castel.

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.



La Esperanto-Tago 2013

La 13an, 14a, kaj 15an de decembro oni solenis la Esperanto-Tagon. CDELI* publikigis por ĉi tiu festo tre allogan afiŝon. La grafikaĵo estis dissendita pere de du vojoj: la paĝo de Universala Esperanto-Asocio en *Facebook* kaj la paĝo de *Federación Española de Esperanto*, ankaŭ en *Facebook*. La afiŝo disponeblas en du koloroj: verda kaj blua, en grandoj A4, A3, aŭ pli.

Hispana Esperanto-Federacio publikigis hispanlingvan artikolon pri ĉi tiu tago:

[Comunicación e igualdad: lema del día del Esperanto, el 15 de diciembre.](#)

* Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia.




La 1a Irana Kongreso de Esperanto (IREK-1) okazos en 2014

Irana Esperanto Asocio (IREA) anoncas okazigon de la unua IREK (Irana Esperanto-Kongreso) en la 24a ĝis 26a de marto 2014. Irano havas longan historion de Esperanto-movado, sed en la lastaj jaroj, esperantistoj de la mondo havis maloftan okazon por viziti Iranon. Jen estas unika okazo por ĝui la esperanta etoson kun abundaj programeroj kaj samtempe iom turismi tra la lando. Menciindas ke la kongreso koincidas kun la Irana novjaraj ferioj kaj tio donas oportunojn por kaj kongresi kaj ĝui la nov-jarajn festojn tra la lando dum la plej favora kaj agrabla klimato.

La kongresa temo: "Esperanto, Lingvo de Ideo kaj Idealo" estas bone elpensita kaj elektita por la unua landa kongreso, en kiu oni prezentos Esperanton al la publiko kaj samtempe okazos seminarioj, prelegoj, diskutoj kaj rapidaj kursoj. En la programo estas antaŭplanita kulturaj aranĝoj kiel arta vespero kaj muziko dum la unuaj du tagoj kaj ekskurso por la lasta tago de la kongreso.

Por scii pli vizitu la oficialan retpaĝaron de la kongreso:
www.espero.ir/irek-1/

Kaj la oficiala retpaĝaro de Irana Esperanto-Asocio:
www.espero.ir



Fonto de la teksto kaj bildo: <http://www.espero.ir/irek-1/>

Revuo Esperanto renoviĝas kaj grafike kaj enhave!

Ramón Morales Castel

Revuo Esperanto havas novan redaktoron: la sinjoro Fabricio Valle, kiu estis elektita por la tasko renovigi la plej konatan presitaĵon en nia lingvo. Por inaŭguri la laboron de la nova redaktoro, Universala Esperanto-Asocio liveris rete la unuan numeron de revuo Esperanto de la jaro 2014, kiu senpage elŝuteblas.

La tradicia revuo Esperanto estis kelkfoje kritikata. La kritikoj temis precipe pri mistajpoj aŭ pri la lingvostilo uzita en la tekstoj. Mi tamen ĉiam opiniis, ke revuo Esperanto estis ja tre bona publikaĵo. Kelkaj opiniis, ke la revuo enhavis multe da tekstoj aŭ ke oni ne publikigis sufiĉe pri certaj temoj. Eble kelkaj kritikoj pravis, sed samtempe oni endas diri, ke certa aro de la esperantistaro estas ja tro kritikema.

Tamen io bona povas ja esti plibonigita! Kvankam mi havis nenion malbonan por diri pri la antaŭa revuo Esperanto, mi ŝatas multe la ŝanĝojn en la nova. La ŝajno estas pli moderneca, kun malpli da tekstoj por ne trudpezigi la leganton kaj pli da fotoj kaj bildoj, kio estas ja nuna tendenco en la internacia revuaro de la plimultaj mondlingvoj.

Placas al mi ankaŭ la uzo de emblemoj kaj ikonoj por logi la rigardon de la leganto kaj la inkluzivado de ligiloj kaj priretaj enhavoĵoj. Sekve do: Gratulojn kaj al la redaktoro kaj al la grafikisto! Mi certas, ke la nova revuo Esperanto ja daŭros kaj finvenkos. Ĝi fakte donis impeton al mi por realigi kelkajn ŝanĝojn en ĉi tiu revuo, kiun vi legas.



Ĉi tiun numeron oni povas senpage elŝuti por la jena ligilo: <http://www.uea.org/revuo/>

Universala Esperanto-Asocio: La Strategia Laborplano 2013-2017

Efektivaj homgrupoj bezonas gvidilojn por estigi la celatajn efikojn pri ia laboro. Unu el la plej gravaj kaj necesaj gvidiloj de la Esperanto-Movado estas la Strategia Laborplano elpensita kaj vortigita de la UEA-estraro por la efektiveco de la tuta esperantistaro. La laborplano donas ĝeneralajn kaj specifajn liniojn ne nur pri tio, kion oni povas fari por la disvastigo de nia lingvo, sed ankaŭ kaj pri tio, kion ni grupe indas kaj endas fari.

La laborplano aprobita por la periodo 2013-2017 estis publikigita en resuma 7-paĝa PDF-dosiero, kies kovrilon vi vidas en la dekstra bildo. La plenan laborplanon oni povas elŝuti de la jena ligilo:

www.uea.org/pdf/Strategia_laborplano_de_UEA_2013-2017.pdf



Por elŝuti la PDF-dosieron klaku: www.uea.org/strategialaborplano



Komunumo

Raportajo de Ricardo Coutinho

Komunumo: estas grupo de entreprenistoj kiuj celas promocii kaj diskoni la daŭropovan disvolviĝon, novan modelon de socio en kiu la produktado, justeco kaj konservo de la naturo estu ekilibre kunligitaj por plibonigi la vivokvaliton de la antaj kaj ontaj generacioj, per retejo en kiu oni povas interrilatiĝi entreprenoj, organizaĵoj kaj personoj kun samcela vidpunkto. Ĝi estas fondita je 2013.

Komunumo estas la unika tergloba reta entrepreno de Socia Responso, Subtenebleco kaj Entreprenohelpo kreita por oferti deversajn varojn kaj servojn al entreprenoj, neregistaraj organizaĵoj, universitatoj kaj ĝenerala publiko interesitaj pri daŭropova disvolviĝo. Nuntempe Komunumo montras en Actualidad, la plej gravajn novaĵojn de Argentino, Peruo, Ĉilio, Kolombio, Venezuelo, Panamo, Meksiko, Dominga Respubliko kaj Hispanio; En Cursos kaj Eventos, kie ofertas kursojn kaj eventojn rilataj al la tri ĉefaj celoj de tiu retejo. En Conocimientos, oni povus legi materialojn, artikolojn kaj publikigaĵojn.

La Teamo de Komunumo estas aro de inĝenieroj, grafikistoj, ĵurnalistoj, komputilistoj kaj filozofo. En sia retpaĝo ne aperas nenia rilato al la lingvo Esperanto, kaj ĝi estas nur hispanlingve skribita, sed la elektado de la vorto "Komunumo" estas tre klarvida.



www.komunumo.com

Heineken Hispanio reklametas Esperanton per enigmo

Ramón Morales Castel

Per publikigo de bildo en *Twitter*, la entrepreno Heineken (Hispanio) reklametas Esperanton la 16-an de decembro. La bildo enhavas enigmon en la internacia lingvo: "Orita de ene kaj verda por ekstere. ¿Kio estas?" Kompreneble temas pri la biero, kio estas ora aĵo ene de verda botelo.

Estas amuze, ke la frazo havas la malferman demando-signon (¿) tiel, kiel oni faras en la hispana lingvo. La frazo tamen povus esti pli simpla: "Ora ene kaj verda ekstere. ¿Kio estas?"

Ajne, jen bona kaj amuza maniero uzi Esperanton!



La 10a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio okazos julie 2014 en Rijeka, Kroatio

Eŭropa Esperanto-Unio anoncis la okazigon de la 10-a Kongreso de EEU en Rijeka, Kroatio. La kongreso okazos de la 6-a ĝis la 12-a de julio 2014 kaj ties temo estos: “Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj, malmultekosta demokratia komunikado”. Jen parto de la invito de Seán Ó Riain, prezidanto de EEU, publikigita en la retpaĝo oficiala de la kongreso:

“Elkore mi invitas vin al la 10-a kongreso de EEU en Rijeka, Kroatio, kiu okazos de la 6-a ĝis la 12-a de julio 2014. Kroatio estas la plej nova membroŝtato de EU kaj havas verŝajne la plej fortan tradicion de Esperanto inter ĉiuj EU membroŝtatoj. La jugoslavia eksprezidanto Tito, kroato, parolis Esperanton, kaj aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 1953 kaj kroata ŝtatprezidanto Stjepan Mesić aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 2001. En Kroatio esperantistiĝis esperantistaj famuloj kiel Ivo Lapenna kaj Tibor Sekelj kaj de tie devenas multaj aliaj gravaj agantoj por la internacia E-movado. De tie devenas Zagreba Metodo de instruado de Esperanto, 90% de teatraj aktivadoj en Esperanto kaj granda daŭra informado pri Esperanto al la ĝenerala publiko.”

Por pliaj informoj, vizitu la retpaĝon de la kongreso kaj la retpaĝon de Eŭropa Esperanto-Unio:

10-a Eŭropa Esperanto-Kongreso de EEU:

<http://eeu-kongreso.webnode.com/>

Eŭropa Esperanto-Unio: <http://www.europo.eu/eo/chefpagho>

10-a kongreso de EEU - 2014

6-a - 12-a de julio 2014

Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj,
malmultekosta demokratia komunikado

Pli da informoj:
www.europo.eu
<http://eeu-kongreso.webnode.com/>

Rijeka - Kroatio

La 73a Hispana Kongreso de Esperanto kaj la 18a Andaluzia Kongreso

En Hispanio okazos ĉi-jare la 73-a Hispana Kongreso de Esperanto kune kun la 18-a Andaluzia Kongreso. La evento estos realigitaj en Arunda de la 1-a ĝis la 4-a tago de majo, kiel estis informite de la diversaj samideanaj organizoj en la eŭropa lando.

Oni trovas pliajn informojn en la retpaĝo de la evento:

<http://arundakongreso2014.wordpress.com/>.

Kaj ankaŭ en la retpaĝaro de **Hispana Esperanto-Federacio**:

<http://www.esperanto.es/hef/>

73 Hispana Kongreso
de Esperanto
kaj 18-a Andaluzia Kongreso
okazontaj en Arunda (Runda)

de la 1-a ĝis la 4-a
de majo 2014

andaluciaesperanto.blogspot.com

La Brita Kongreso de Esperanto ĉi-jare estos en Sheffield

Estis anoncita la okazigo de la 95-a Brita Kongreso de Esperanto, kiu estos realigita en Sheffield, de la 18-a ĝis la 20-a de aprilo ĉi-jare. La evento konsistos precipe el prelegoj fare de elstaraj esperantistoj, komuna manĝo postkongresa kaj ekskurso al Brodsworth Hall.

La prelegontoj estas Chuck Smith, Renato Corsetti, Anna Lowenstein, Jack Warren, Paul Gubbins, Judith Meyer, Ed Robertson. En la retpaĝo de la kongreso oni trovas detalajn informojn pri la prelegontoj kaj ties sperteco en nia lingva komunumo kaj ankaŭ informoj pri la aliaj dumkongresaj farotaĵoj. La ekskurso al Brodsworth Hall okazos lunde la 21-an.

Jen la adreso de la retpaĝo de la kongreso:

<http://britakongreso.org/eo/>



Esperantistaj kaj spiritistaj eventoj en Brazilo

En Brazilo, lando kun tre agiva E-movado, okazos ĉi-jare kiel kutime pluraj interesantaj esperantistaj eventoj. Du ekzemploj estas la 49-a Brazila Kongreso de Esperanto, kies temo estos "Esperanto, kial ne?", de la 24-a ĝis la 28-a de januaro en Florianópolis. La dua estas la 7-a Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj-Spiritistoj, kies temo estos "La disvastigado de Esperanto en Spiritisma Medio". Tio okazos la 28-an kaj 29-an de januaro ankaŭ en Florianópolis (Florianopolo, Sankta-Katarino). Ĉi tiu lasta estas organizata de Brazila Asocio de Esperantistoj Spiritistoj kun apogo de aliaj brazilaj organizaĵoj. La unua estas organizata de Esperanto-Klubo de Florianópolis, Brazila Esperanto-Ligo kaj la Registro de la Ŝtato Santa Catarina.

49-a Brazila Kongreso de Esperanto

Temo:
ESPERANTO, KIAL NE?
 Disvastigado kaj Instruado de la Lingvo.

Tema:
ESPERANTO, POR QUE NÃO?
 Divulgação e Ensino da Língua.

Dato: de la 24-a ĝis 28-a de januaro 2014
 Florianópolis/SC
Loko: Hotel Castelmar

Inscrições/Alíqoj:
<http://esperanto.org.br/49bke>

Organizantoj | Organizadores **Apogo | Apoio**







7-a Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj-spiritistoj
7-a BRES

Ĉeftemo: La Disvastigado de Esperanto en Spiritisma Medio
Dato: 28-a kaj 29-a de Januaro, 2014
 Florianopolo, Sankta-Katarino - Brazilo

Realiganto: 

Apogoj:



Pilaj Informoj:
 **Brazilia Asocio de Esperantistoj Spiritistoj**
<http://esperanto-spiritismo.org/baes.htm>
Castelmar Hotel - Rua Felipe Schmidt, 1260, Florianópolis - SC

La 21-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Lloret de Mar de la 6-a ĝis la 12-a de oktobro 2013

Raportas: Liba Gabalda

Kelkaj entuziasmaj katalunaj esperantistoj organizas ĉiujare allogan E-Semajnon ĉe la marbordo de Mediteraneo. Ĉiam ĝi okazas alterne norde kaj sude de Barcelono. Ĉi-foje la bela urbo Lloret de Mar gastigis tiun-ĉi eventon. Lloret estas unu el la plej vizitataj turismaj centroj de la "Costa Brava"- Sovaĝa Marbordo. En la pasinteco ĝi dependis de la konstruado de ŝipoj, fiŝkaptado kaj agrokulturo. La kampojn anstataŭis modernaj hoteloj laŭlonge de la strando. Ni loĝis en la plej granda, en la hotelo "Don Juan" kun 869 ĉambroj. Ĝi estis plene okupata. Por niaj aktivaĵoj ni disponis pri granda salono.

La aranĝon partoprenis 136 esperantistoj el 15 landoj. Venis pluraj novuloj, kiuj asertis partoprenon denove venontjare. La plej aĝaj estis 95 kaj 97-jara bone parolantaj geesperantistoj el Sant Cugat del Vallés. Tie okazis la unuaj du E-Semajnoj iniciatitaj de s-ino Trini Garcia Corbach. Kun nostalgio ŝi rememoris tiujn eventojn.

La inaŭguran ceremonion ĉeestis la urbestro de Lloret s-ro Romà Codina i Maseras. Li afable bonvenigis nin dezirante sukcesan restadon. Inter elstaraj personoj troviĝis Barbara Pietrzak el Pollando, kiu salutis nome de UEA. Tuj posttagmeze ŝi prelegis pri la gazeto Heroldo de Esperanto menciante ĝiajn iamajn redaktorojn. Ŝi ĉefe omaĝis kaj substrekis la grandan laboron kaj meriton de Ada Sikorska Fighiera por Esperanto. Barbara ankaŭ iom rakontis pri la E-movado en Pollando kaj ĉefe pri la Pola Retradio, kies elsendojn ŝi efike prilaboras kaj prezentas.

De Paŭlo Branco ni eksciis pri la funkciado de Eŭropa Unio. Li, kiel kompetenta persono, pro siaj funkcioj en diversaj institucioj de EU detale priskribis la nuntempan situacion en Bruselo.

Wolfgang Günter en siaj prelegoj "Kulturo de daŭropoveco" parolis pri neceso de la malpliigo de produktado kaj konsumado por pli digna vivo de ĉiuj. Krom aliaj gravaj punktoj li atentigis pri klimatsanĝiĝo kaj ties malbonaj konsekvencoj por estontaj generacioj.

De la geedza paro Buŝs el Latvio ni eksciis pri la fama litova pentristo kaj komponisto Mikolajus Konstantinas Ĉiurlionis. Ilia dua prelego temis pri la tri

Baltaj landoj. Samtempe ili invitis partopreni la 50-an jubileon de BET (Baltaj E-Tagoj) okazonta venontjare en Latvio.

Nia kara organizanto, poeto kaj pensemulo Luis Serrano Pérez dediĉis sian ampleksan prelegon al "La Agrokulturo". Temis pri influo de agrokulturo al la homa vivo ekde la pratempo ĝis nun. Li emfazis la fakton, ke sen agrokulturo ne povas ekzisti la vivo. En lia interveno kaj debato "Ĉu la E-movado kontentige progresas" estis iom malfacile konvinki lin pri daŭra progresado malgraŭ tio, ke ne okazas tiom da klubaj aktivaĵoj kiom en la pasinteco. La moderna epoko alportas novajn rimedojn, eventojn kaj aliajn aktivaĵojn.

Rodica Todor el Rumanio instruis Esperanton al la partoprenantoj de diversnivelaĵoj. En la E-kurso fluparolantoj plenumis donitajn taskojn dum ŝi okupiĝis pri komencantoj. Rodica kuraĝigis kaj lerte gvidis ilin al progreso. Kun granda entuziasmo ŝi sukcesis kontentigi ĉiujn grupojn.

La premio de Ada Sikorska Fighiera estis ĉi-foje atribuita al s-ino Alicja Lewanderska-Quednau pro ŝia efika laboro por Esperanto. Kiel kutime okazis ekskursoj. Ŝipe ni direktiĝis al la proksima urbeto Tossa de Mar, kie ni supreniris (kelkaj - per urba trajneto - aliaj piede) al kastelo por ĝui belan panoramon. Restis tempo por promeno tra stratoj kaj kafumado. Dum alia duontaga ekskurso ni vizitis la maran muzeon en Lloret kaj ekkonis ĝian historion. La tuttaga ekskurso estis tre aprezata. Ĝi gvidis nin al Girona, kie ni vizitis la malnovan kvartalon, vidis la katedralon kaj poste ni daŭrigis tra montareca pejzaĝo ĝis la ĉemara urbeto Cadaqués. Iuj el ni promenis ĝis la urbeto Portlligat por vidi la domo-muzeon de la fama pentristo Salvador Dalí.

Dum vesperaj programeroj ni dufoje "interkonatiĝis" ĉe vintrinkado. Ŝercoj, kantoj kaj poemoj animis tiujn vesperojn. En alia vespero la edzino de Luis, Maria Ferigle, per DVD prezentis la operon "La Traviata". Ne mankis folkloro vespero kun havanaj kantoj de la jam konata ensemblo "Montjuit" kaj la fama trinkaĵo "Cremat", per kiu finiĝis en gaja kaj neforgesebla etoso la 21-a E-Semajno. ☆



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

La Insulo de Nemo (X)

Johano Negrete

Dum la granda aviadilo trairis la densan malluman nubaron de la nokto, kvazaŭ timiganta ferdrako propra de infanaj rakontoj, survoje senĉese al ĝia celo trans la atlantika oceano, Nemo ankoraŭ povis fermi eĉ ne unu okulon. La dormado jam invadis la plej multon el la pasaĝeroj, sed li, tute konsternita kiel li estis pro la verda kajero donacita de Munja, febre ĝin reviziis unu kaj plurajn fojojn sur lia aviadila sidloko, kvazaŭ fermita diamanto nun tenita ĉemane.

Sekve, Nemo daŭrigis la legadon de la unuaj retaj leteretoj interkrucaj de li kaj Munja jam tri jarojn antaŭe, kaj nun kolektitaj en ĉi tiu kajero.

Mi dankas. 10an. de septembro, 1999.

Saluton Nemo.

Multajn dankojn pro via saluto, intereso kaj gratuloj.

Mi tre feliĉas pro tio. Vi bele scribis. Mi ricevis mesaĝojn el sep landoj. Mi scias, ke via mesaĝo venis el Venezuelo. Antaŭe mi laboris sur ŝipoj kaj vizitis Venezuelon kvarfoje. Mi tres ŝatas Sudamerikon. Ĉiam mi memoras, kian varmegon mi sentis la unuan fojon elirante el aviadilo en flughaveno de Karakaso.

Ni daŭrigos kurson sekvantsemajne. En mia vilaĝo loĝas 400 homoj. Mia celo estas ke 30 el ili esperantiĝos. Amike.

Munja Vareski.

“Do, surprizo, ke li aŭ ŝi sendube maristo jam scias, ke mi estas venezuelano kaj eĉ konis mian landon! Ne imagis mi unue kiom da tempo li pasis en Venezuelo. Kia avantaĝo ankaŭ mi pensis tiam se li paroletas la hispanan.

Mi memoras, ke mi dubis ĉu sekvi aŭ ne tiun korespondadon, ĉar nur principe sento de solidareco impulsis min gratuli pro lia kurso. Sed nun tiu ĉi informeto aŭmentis mian kuriozemon kaj demandojn, kiujn mi gardis por alia okazo. Ĉu maristo alvenis mialanden per aviadilo? Strange. Ĉu li havis amikojn en Karakaso? Ĉu maristo en milita ŝipo? kaj tiel plu. Do, mia respondletero devis esti tre prudenta kaj mi kredas ke tiel ĝi estis.”

Ne dankinde. 11an de septembro 1999.

Saluton Munja.

Pere de via nomo mi ne povus scii ĉu vi estas viro aŭ virino. Pardonu min, ke mi ne familiariĝas je finnaj nomoj, sed kredas ke pro via laboro sur ŝipoj vi devas esti viro. Mia nomo Nemo estas samkiel la kapitano de Naŭtilus, kaj certe vi konas tiun faman romanon. Laŭ la latina lingvo ĝi signifas “neniu”. Do mi estas “neniu” persono. Aŭ eble io.

Mi kontentas ke vi jam vizitis Venezuelon. Bedaŭrinde pri Eŭropo mi konas malmulte kaj neniam mi vizitis Finnlandon. Nur en la

pasinteco kelkajn mediteraneajn landojn. Mi naskiĝis en Hispanio, kvankam loĝas en Venezuelo jam de longe, ekde mia juneco. Iusence, do mi estas “sudulo” tie kaj ĉi tie.

Mi ankaŭ instruas Esperanton, aparte de la angla kaj germana; ĉar mi estas lingvisto, kaj mi esperas ke ni povus interŝanĝi spertojn pri lingvoinstruado.

Mi deziras al vi multajn sukcesojn.

Nemo.

“Kaj la klariganta respondo pli malferma kaj agrabla venis rapide: tri tagojn poste, kiam mi jam ne pensis pri korespondado kun nekonata finno.”

Hola 16an de septembro 1999

Saluton Nemo.

En finnlandaj ŝipoj laboras ankaŭ virinoj. Mi laboris kiel telegrafistino. Dum mia unua vojaĝo vizitis Kanariajn Insulojn, Las Palmas. Mi estas 40-jara. Unuafoje mi lernis la lingvon internacian en 1973, kiam estis kurso en finna radio. Sed mi forgesis ĝin, ĉar ne trovis Esperantujon. Sekvantfoje mi lernis la lingvon en kurso dum 1989, kiam mi komencis korespondi kaj legi esperante, sed nur ĉi-somere mia lingvointereso aktiviĝis. Ni daŭrigos kurson la venontan mardon. Foje mi ne povas uzi la akuzativon korekte, sed bonvolu ne zorgi pri ĝi. Mi kredas, ke plej grava estas, ke ni komprenu unu la alian. Kore el la arbaro...

Munja

“Ha, virino! Kia eraro! Korespondado kun virino estis ege interesa tiutempe, kiam ankoraŭ mia lingvokono de la internacia lingvo ne estis altega aŭ sufiĉe densa, ke oni povu ĝui bonnivelan literaturon. Nu, kian pikantan kaj plaĉan kuriozaĵon povus veki virino alilandana kaj plie... el tre fora parto de la tero! Munja venis al mia vivo preskaŭ kiel eksterteranino. Tamen bonŝance ni havis komunan lingvon.

Mi memoras, ke ĉi tiu letero tre plaĉis al mi, kaj donis vere bonan impreson. Ho, jen Munja! Finnlandino kiu ŝajnas serioza, laborema, kun vivosperto per vojaĝoj, ankoraŭ en tre bona kaj matura aĝo, kaj kiel telegrafistino, ŝi skribis mallonge, koncize, klare kaj, malgraŭ ĉio ĉi, dense. Almenaŭ mi kontentis ŝi skribas laŭmaniere kiun mi ŝatas. Certe ne kiel babilema virino.”

Kaj tiel Nemo rezonadis legante la verdan kajeron kiel aro da pecetoj nun ligitaj ĉe unu sama papera mozaiko. Liaj pensoj ankaŭ flugis for de la aviadilo, kaj pli tien el la malhela ĉirkaŭanta nubaro. Al lia nostalgio pro la amara disiĝo ĵuse spertita unuiĝis subite la memoro de tiuj kunkatenitaj tagoj, kiam komenciĝis la retaj kontaktoj kun lia amatino. La sekva letero montris lian kreskantan intereson pri la personaj trajtoj de tiu virino, kaj tiel iom



La Insulo de Nemo (X) Johano Negrete

post iom fluis neatendita disvolviĝo de ambaŭ karakteroj.

Surprizo! 19-an de septembro 1999

Saluton Munja.

Mi multe ĝojas, ke vi respondis.

Vi ja vizitis multajn landojn kaj tio estas enviinda. La kombinaĵo de Esperanto kaj marvojaĝo devas esti tre bona por mondĝuado. Via nomo vere belas kaj pli taŭgas al virino ol viro. Mi supozas, ke ĝi estas elparolata kiel en esperanto kaj same Vareski. Mia nomo ankaŭ senprobleme.

Kial vi adiaŭas «el la arbaro»? Ĉu vi loĝas en arbaro? Se tio veras, vi vivas en plena harmonio kun la naturo kaj tio devas esti... «feliĉa vivo».

Mi deziras multajn sukcesojn al vi pri via kurso kaj aktivado en via urbo, aŭ vilaĝo... aŭ arbaro.

Multajn bondezirojn!

El la urbego...

Nemo.

Nun la korespondado turniĝis rapida, de unu tago al la alia. En malmultaj horoj, por ne diri tagojn, sekvis serion da leteroj. Al ĉiu demandeto sekvis areto de aliaj demandoj, kiuj teksis senkonscie novan kaj pli interesan kontakton, kronita de ia mistero pri la vivo, pensoj, pasioj kaj agadoj de ambaŭ homoj, kiel se la konversacio estu persona.

Ankaŭ mi 20-an de septembro 1999

Bonan nokton Nemo!

Ankaŭ mi ĝojas ke mi renkontis vin en la reto. Vi estas la unua lingvisto kun kiu mi komunikas. Mi ne studis en universitato.

Ankaŭ mi ŝatas vian nomon.

Mi rigardas tra la fenestro al la nokto kaj iomete ploras. Oni ne ĉiam estas feliĉa, kvankam oni vivas en harmonio kun naturo. Jes, kiam mi rigardas tra la fenestro de mia domo mi vidas nur arbojn.

Oni prononcas la finnan simile al Esperanto.

Kun bondezirojn al la urbego, al la lando kun ruĝa tero,

grandaj palmoj kaj belegaj papilioj mi memoras, mi memoras.

Munja.

Nemo respondis kun amplekso pritraktante eniri en tiajn sentojn, apenaŭ esprimitajn de la fremdulino. Filtriĝis senteton de nesufiĉa kontento kun sia propra vivo, au ĉu simpla fadeno de rezonado pri intelekta ludo de homo-naturo instigita de Nemo mem? Tiuj filozofiaj konsideroj sekvis senpaŭze en la respondo de Nemo.

Ankoraŭ Finnlando someras. 22-an de septembro 1999

Bonan matenon Munja!

Finnlando estas lando de arbaroj. Multaj arbaroj por malmultaj loĝantoj. Bonege! Ankaŭ en via lando multas lagoj; preskaŭ unu po loĝanto. Ankoraŭ pli bonege!

Mi ne memoras, sed mi scias, mi scias, ke Finnlando estas unu el la plej naturaj lokoj, kiu restas ankoraŭ sufiĉe netuŝata. Ĉu norda paradizo?

Baldaŭ granda parto de la tero blankiĝos. La vintro venos, kaj se ĝi longas multe malĝojo invados homojn kaj suferos pro melankolio.

En Venezuelo bonŝance estas du sezonoj sen vera vintro: unu pluva, alia seka kaj suna. Mi vidis ĉe revuo, ke finnoj vintre sin banas nude en glacia akvo dum ili ridas. Kuraĝa spito al la vintro!

Laste vi diris, ke trafenestre vi rigardas la nokton kaj ploretas. Kial? Se oni observas la universon, ĝia vasta grandego plenigas nin de soleco. Ni povus eviti tion se oni «fermas la fenestron»; eble la ploro ĉesos kaj la animo refortiĝos. Provu! Vere, oni he havas la devon esti feliĉa tuttempe, se tio signifas konstantan ĝojon. Bone ŝajnas kelkfoje ĝojo kaj alifoje malĝojo. Sed pri feliĉo, konsideru ĝin nur en la kadro de nia tuta vivo. Laŭ mi la feliĉosento invadas oniajn vivojn, se ili jam valoras je la servo de aliuloj (familio, amiko, proksimuloj, kaj grandlitere la homaro).

Ĉu vi ŝatas poezion? Mi supozas ke jes, ĉar vi, Munja, evidente ŝatas la maron, la liberan ĉielon kaj vizitadon de landoj. Do, mi prezentos al vi la poemeton MIA KREDO de grava esperanta poetino (la anglina Marjorie Boulton), de kiam ŝi ankoraŭ ne estis matura verkistino. Tamen mi ŝatas ĝin.

«Mi kredas al la valor' de amo, art', sci',
Al la mister' de l' nekonata mi,
Aŭ ĉu mi diru nekonata Di'?

Al homoj stulte blindaj, triste drivaj
Sed homoj, ne simioj, plene vivaj
Kaj tiel esperplenaj, progresivaj...

Al la valoro de la viv' mi kredas.
La viv' turmentas, sed neniam tedas,
sola trezoro, kiun ni posedas.»

Sincere, ĉi-foje el mi mem, bondeziras al vi.
Nemo.

De Munja al Nemo

Ne, aŭtunas 22-an septembro 1999

Ĉio bona Nemo!

Arbofolioj estas flavaj kaj ruĝaj, kaj preskaŭ ĉiuj jam falis. Tage ni havas +13 centigradojn; nokte +2. Vi pravas; baldaŭ ni havos vintron, eble post

La Insulo de Nemo (X) Johano Negrete

du semajnoj. Lastavintre ni atingis -43 C-gradojn. Apenaŭ oni povis eksteri.

Ofte ni iras al saŭno, kaj iuj homoj kuras al la neĝo el varmega saŭno. Tiel la neĝo ne ŝajnas malvarmega.

Post neĝbano oni reiras al saŭno kaj ĵetas akvon al stovo (forno plenita kun ŝtonoj, kun la fajro sube) kaj ĉarma varmo disvastiĝas al saŭno. (Iuj homoj ankaŭ naĝas en lago sammaniere). Nu Mi faris tion kiam infanino sed ne plu.

De Nemo al Munja

Tamen aŭtunas miakore. 25-n de septembro 1999.

Korajn salutojn Munja.

Bela, bela aŭtuno, blovu, blovu mian koron!

Aŭtuno ŝajnis al mi la plej bela sezono, kiam mi loĝis en Europo kaj Usono.

Bona rakonto kun viaj unikaj kutimoj pri neĝo kaj saŭno. Tio devas esti tre amuza kaj sanema. Iom mi jam legis pri tia kutimo, kvankam antaŭlonge, kiam la revuo Esperanto publikigis artikolon pri Finnlando kaj ĝiaj loĝantoj, okaze de la Universala Kongreso en Tampere. Tiun artikolon mi tralegis kuriozeme.

Ankoraŭ mi ne scias kiam mia kurso komenciĝos, nek pri la nombro da registritoj. Se ne estos sufiĉe da ili la kurso ne okazos. La universitata regularo decidas ĝis certa nombro kaj mi ankaŭ. Mi vidos tion post ĉi feriaj tagoj. Pri lernolibroj, multe plaĉis al mi la 3-kajera Tendaraj Tagoj de Stefan MacGill. Mi rekomendas ĝin post uzado de la unua kajero pasintsemestre. Kaj malgraŭ, ke tiu teksto estas por infanoj, mi uzis ĝin kun plenkreskuloj kaj ĝi taŭgas ankaŭ.

Bonvolu ne zorgi pri la akuzativo, ĉar vi faras bone. Ankaŭ por hispanparolantoj la akuzativo estas stranga kazo aŭ ĝi fremdas. Do, ili ofte forgesas literon "n", precipe en la parolado. Al mi ankaŭ ĝi malfacilas, ĉar mi lernis la lingvon ne june, sed maturiĝe. Aliaj uzas akuzativon (la rusa, germana, pola ktp.). Mi ne scias pri la finna.

Mi jam devas adiaŭi. Estas tre malfrue nokte (12.11 atm); mi lacas, malgraŭ ke mia koro brilas kiam mi amigkiĝas je vi perletere.

Amike salutas vin

Nemo

De Munja al Nemo

Terve 28-n de septembro 1999

Terve (saluton) Nemo!

Vi ĉiam skribis tre bele. Ĉu vi skribas poemojn aŭ librojn? Mi provas imagi kiaj estas viaj tagoj tie en urbego. Multaj homoj, multaj aŭtoj,

varmego, palmoj, varmega bonodoro de Sudameriko. Vento, maro...tiu verda maro! Mi ne vojaĝis sur la maro ekde aŭgusto 1991. Sekvantfoje kiam mi vidis maron estis tri jarojn poste. Mi tre ploris kiam mi denove renkontiĝis kun ĝi.

Mi ne laboras ekster la hejmo. Mi bredas fiŝojn (salmonojn kaj trutojn). Tio estas preskaŭ hobia. Tre malgranda entrepreno. La fiŝbredado mi heredis el mia patro.

Ĉi-vespere ni estis naŭ personoj kaj mi en la kurso. Venis du novuloj. Ne ĉiuj venas ĉiam. Ni havas Tendaraj Tagoj kaj nova lernolibro de Lars Forsman kiel lerniloj. Ankoraŭ ni ne decidis kiu estus pli bona. Ni havas bonan kurson. Lernantoj lernas kaj mi ĝojas kaj ĝuas.

Ĉi-nokto...nigrega; mia menso...lumega. Mi ridetas.

Kore

Munja.

Maltrankvile sur la aviadila sidloko Nemo fermis la verdan kajeron. Li volis rememori la lastajn tagojn ĉe la maro kaj sub lunlumo. Speciale tiun nokton sur kajero Pajklana, insuleto de forlaso, ĉar li kaj Munja perdis kontakton kun la boatisto, kaj devis resti en Pajklana senrevene ĝis malfrue nokte. La postan tagon ili sciis, ke la boatisto suferis leĝeran akcidenton kaj eniris hospitalon. Nenio grava. Tamen la boatisto, estis la ulo, kiu veturigis la geparon tra plurajn insuletojn, kiu silente enkondukis ilin al la beleco de tiu tropika mara parko, pri kiu Munja revis jam delonge. La sama parko, tie, kie la geparo travivis nekompereblan fascinan animkomuniĝon, de forlasita amoraĵo, forteveka al pasioj, kun destino samplezura en aromo de amo, la ĉefa espero de la individua vivaranĝo. En tiaj cirkonstancoj, «Ne ekzistas skribo nek letero ama, kies elokvento estus tiel flama, kiel sola brilo de rigardo via, kiam ĝi parolas kun rigardo mia», kiel lirikstile diris la poeto Julio Baghy en sia poemo «Kial skribi al vi?».

(Daŭrigota)





La Eldevigo, vera rakonto

Ricardo Coutinho

Johano Sousa estas komercisto, liaj gepatroj estas portugaldevenaj kaj li mem naskiĝis en Angolo du jaroj antaŭ la sendependiĝo de tiu afrika respubliko. Antaŭ lia plenaĝigo li laboris kun sia frato transportante nutraĵojn al diversaj lokoj ĉirkaŭ la ĉefurbo de Venezuelo. Per sukcesoj kaj malsukcesoj li atingis aĉeti viandejon kaj pruntpetis al bankoj monon por plibonigi tiun entreprenon. Dankon al tiuj invitoj la viandejo de la “Ruĝaj Pordoj” estis la plej fama de la vilaĝeto de Okumareo (unu horo for de Karakaso)

Ĵaŭde, kiel ĉiu tago de la monato, la sinjoro Johano alvenas al sia entrepreno je la 7:40 atm, permesas la eniron de siaj dungitoj ĉar oni devas pretigi la servojn antaŭ malfermi “La Ruĝajn Pordojn”. Estas tradicio ke almenaŭ unu aŭto estu fronte al la viandejo kaj pro tio li ne rimarkis strangan situacion. Kiam li permesas la eniron de sia dungitoj policgrupo haltigas homon kaj petas dokumentojn. La frato de la sinjoro Johano fermas la pordon kaj oni eklaboras.

Tuj la policanoj batis la pordon kaj petis al la komercisto iri policejen, la komercisto iris sen rimarki la situacion tuŝi lin direkte. Laŭ la policanoj li aĉetas ŝtelitajn bovojn kaj la vendantoj atestis ke li ofte aĉetas iliajn bovojn, la komercisto diris ke efektive ili de tempo al tempo vendas al li tiujn bovojn sed la vendantoj ĉiam donas al li la haŭtojn de la bovoj kun la brulmarko de la bieno de tiuj homoj. Laŭ la policanoj la bovoj ne havas haŭton kaj la vendantoj estis ĉe la viandejo por vendi tiujn ŝtelitajn bovojn.

La edzino de la komercisto alvenis al la viandejo kaj demandis kie estas li, la bofrato diris ke li devis iri al la policejo sed li ne rimarkis kial li devis iri tien. Tuj la edzino iris al la policejo. Tie li demandis la policistojn pri la okazaĵo, kaj ili respondis tre malĝentile ke li estas implikita en bovŝtelo, ŝi vidis la ŝtelistojn man-katenitajn sur la koridoro, ŝia stomako suferis pro la nervozo. Ĉu mia edzo estas tiel?

Ŝi telefonis al la kuzino de Johano, la bofratino de la kuzino estis policano kaj eble ŝi povus helpi lin.

Efektive la sinjorino Erika iris al la policejo kune kun sia edzo, karakasa juĝito kaj ekspolicano. Ili parolis kun la policestro.

- Saluton estimata policestro, mia nomo estas Erika, mi estis policanino kaj mia edzo estas juĝito, ni deziras scii ĉion kio okazis al la sinjoro Sousa.

- Tiu sinjoro estas implikita je aĉeto de ŝtelitaj bovoj, ni havas filmojn kiuj atestas tion. Do, diru al la edzino de la sinjoro Sousa ke la postulo de mono kiun mi faris al sia edzo aldonu 50 mil bolivarojn pli pro via vizito. Kaj diru al ŝi, se la sinjoro Johano ne povus la monon, li restus dum dek jaroj en malliberejo, kaj ni sendu reprezentantojn de la Instituto Pri Aĉetanto-Rajtoj al la viandejo ĉar li vendas viandojn kiuj ne estas reviziitaj por la Saninstituto, ĉar tiuj bovoj estas ŝtelitaj. Kaj la Impostinstituto ĉar ŝtelistoj neniam donas kvitancojn. Vi jam povas iri, dankon.

La ekspolicistino diris al la edzino de Johano, donu tiun monon, la policestro estas ligita al ŝtelo de aŭtoj kaj aliaj mafioj.

La edzino de Johano iris al la viandejo, prenis tutan konstantan monon, petis monon al la kasistino kaj aliaj. Kaj ŝi iris al la policestrejo, kelkaj policistoj ne deziris ke ŝi prenu la aŭton de Johano ĉar ĝi estas konfiskita.

Kial? Ĝi ne aperas je la problemo, mia edzo uzis ĝin nur por alveni al la policejo. Post longa disputo, ili lasis la aŭton. Post la dono de la mono, ili permesis al Johano reveni al sia hejmo.

Je la nokto, iu policisto telefonis al ŝi por diri ke la mono estis malpli ol la interkonsentita. Ŝi koleriĝis kaj diris lin friponulo kaj senhontulo. La policisto de tempo al tempo telefonas sed ŝi jam ne akceptas tiujn alvokojn ĉar oni povis taksi ke tiu fripona policisto decidis ĉantaĝi ŝin individue, ne kun la konsento de la policestro por profiti la timon de la komercisto. ★

Antaŭjuĝo

Sire Pérez

Lernantino aŭtodidakta de Esperanto. Guatire, Ŝtato Miranda.

Post la publikigo de la Leĝo Kontraŭ Sekso-ne-tradicia-reklamado en Rusujo igas min verki tiun artikolon. Laŭ la rusa registaro tiu leĝo kontraŭbatalas infanseksumadon ĉar ĝia vidpunkto la gejo ŝatas seksumi kun malplenaĝaj homoj. La infanseksumado estas fakte rilaton ne konsentita ĉar la infanoj ne estas sekse kaj mense taŭgaj por ĝi, sed tiu konduto estas ligita “antaŭjuĝe” al gejoj senrimarkinde ke tiel gejoj kiel aliseksemaĵoj povus fari tion.

Pri edukado en geja etoso, enhavas multaj malveroj. Mi konis kelkajn virinojn kiuj estis amantinoj kaj edukis infanojn, kaj malgraŭ la aserto de la plimulto, iliaj gefiloj estas homoj kiuj estas aliseksemaĵoj kaj akceptas la amrilatojn de siaj patrinoj. La aserto ke “gejo gejigas infanojn” estas maljusta ĉar ĉiuj gejoj kiujn mi konas estas filoj de tradicia familio, eĉ de tro religiemaj familioj. Aldone al tio mi konis tri fratojn kiuj estas samsekamuloj.

La kontraŭgaj-reklamado timigas homojn senti sin bone, ili vidas sin perfiduloj ĉar egalas infanseksumadon al seksumado konsentita inter du

homoj de la sama sekso. Oni povus suferi pro malsinvalorigo eĉ senti sinmortiĝosenton.

Mi nun vidis filman raportaĵon de Discovery Health de Gary Jonson, kimra ludanto de Rugby, per li oni povus rimarki ke malgraŭ la onidiro ke “gejoj estas virinecaĵoj”, ekzistas samseksamuloj kiuj estas tre virecaĵoj, same kiel virinoj kiuj estas tre virinecaĵoj.

Ĉu oni devus kondamni ilin dankon al la Biblio? Oni povus trovi ĉion en ĝi: apogon al sklaveco, submeton de virinoj, mortopunon, tkp, tkp, tkp.

Ĉu meritas kondamni homojn pro niaj propraj antaŭjuĝoj?

Iam niaj praavoj estis kondamnitaj pro la amrilatoj inter homoj de diversaj haŭtkoloroj kaj post longa lukto oni permesis ilin. Kial oni ne donu nun alian paŝon favore al homaj rajtoj? ☆



Fotoraportaĵo: El Fortín de La Galera

Ricardo Coutinho

Fortín de la Galera estas monteta fortikaĵo en Margarita, la plej granda insulo de Venezuelo. En ĝi venezuelanoj forte kaj fiere batalis kontraŭ la invado de la hispana generalo Pablo Morillo (8^a de aŭgusto 1814). Dankon al tiu kuraĝa konduto de la margaritanoj por defendi sian sendependenco de la hispana imperio, Bolívar nomigis al ili spartanojn; la Insulo Margarita kaj Coche estas la Ŝtato “Nueva Esparta” (Nova Sparto).



Fotoraportaje: El Fortín de La Galera

Ricardo Coutinho



Fotoraportaje: El Fortín de La Galera

Ricardo Coutinho



Fotoraportaje: El Fortín de La Galera

Ricardo Coutinho



Recenzo: Eksterteranoj ankaŭ scias pri Esperanto

Johano Negrete

Apenaŭ mi memoras, ke Andreo Turrisi donis al mi libron iufoje jam delonge por fari recenzon, kion mi ne volis aŭ ne povis tiutempe. Pli malpli estis dek jarojn antaŭe, kaj ĝi ripozis forgesita en mia biblioteko. Senpardone pro tio, mi tamen decidis ripari la malnovan ŝuldon. La libro estas eldonita en Italio kaj en la hispana lingvo. La aŭtoro, ne tre konata en la venezuela katolika Eklezio, sed tamen episkopas: Monsinjoro Eleazar Aguilar Solá. La titolo: *Utopia Extraterrestre* (Ekstertera Utopio); Eldonejo Didaskalion, Turino, Italio, 1999. (92 pp.)

Mons. Aguilar Solá (1925-1999), venezuelano, naskita en Montalbán, Estado Carabobo, disvolvis laŭ biografia rezenceto mirindan socian laboron kiel pastro, kvankam oni ne celas ĉi-okaze rakonti pri lia profesia vivo, malkrom ke li ne vidis ĉi romanon eldonita. Tial ĝi aperis kiel postmorta omaĝo. Interese estas diri ke, ĝis mia nuna scio, la verkisto ne estis esperantisto, kvankam ŝajnas sufiĉe simpatianto de la internacia lingvo pro aperi ĝin en sia rakonto pri eksterteranoj.

La ĉefrolantoj estas unuflanke la venezuela familio Montalbo-Dacosta /Dakosta/, de la urbo Valencia (Carabobo), kiu vojaĝas al la Insulo de Pascua /Paskva/, en la pacifika oceano de Ĉilio, insulo de aparta mistero kaj grandaj statuoj (Moais); aliflanke estas familio de spacaj vojaĝantoj, kiu savas en tormenta nokto ĉe-mare la venezuelan familion kaj tiel komencas la rilaton de ambaŭ familioj. Fizike eksterteranoj estas preskaŭ tute egalaj al homoj. La priskribo de faktoj estas tre bonkorema, eĉ oni dirus iom naiva, ĉar tiu nenormala renkonto kun spacŝipo kaj eksterteranoj pasas kun absoluta natureco, kiel se oni trovus nekonatajn pilgrimojn survoje al iu ajna sankta loko, kaj kie la konversacio fluus kun natura senmalico.

Per dialogoj inter venezuelanoj kaj eksterteranoj aperas ekologiaj zorgoj pro la homardestino, subpremise, ke nia homraso estas memdetrua en pluraj sencoj kaj ĉion ĉi dirita laŭ trea simpla stilo. Konversacioj pri la monda ekonomio,

iom da metafiziko, distingo inter scienco, kaj progresema teknologio kaj saĝo (ĉi lasta malabunda inter teranoj) kaj senmanke stariĝas la religio, kun rakonto al eksterteranoj pri la vivo de Jesuo. Sekvas fina alvoko al la homaro halti la militon kaj Terdetruon, uzi la interlingvon Esperanton kaj dediĉi la vivon al la boneco kaj saĝo por la bono de la homaro.

Sendube la scienckoncepto ĉi-libre estas senanaliza, rektulinia, nediskutebla, do triviala. Iom monotonas la abundo de moralaj kaj pozitivaj kvalifikoj al ĉiuj aperintaj personecoj. Tamen altiras la atenton prezenti scenojn de dialogoj inter teranoj kaj eksterteranoj, kiuj almenaŭ stimulas la leganton imagi kiel devus esti tiaj dialogoj laŭ pli reala pritrakto. Alikaze surprizas scii, ke eksterteruloj aŭ kosmuloj uzas absolute neniun armilon por sin defendi; ankaŭ, ke ili konatiĝis kun Esperanto per teraj radiaj programoj (Vatikano, Habano, Varsovio, Berno kaj aliaj). Kaj ĉar la kosmuloj rakontas, ke en sia civilizacio oni adoptis alian planitan komunan interlingvon, ankaŭ teranoj, profitas eksponi la kialojn, kutime konataj, por ke la teranoj adoptu ekzistantan interlingvon nomita Esperanton, kaj laŭ tio imiti la eksterteranojn en ties planedo. (1)

Krome, pri Esperanto estas ankaŭ alia akra morala kritiko kiel la jena.

«Estas pluraj faktoroj kiuj malhelpis la disvastigon de Esperanto. La homa inercio de tiuj, kiuj rekoninte, ke la lingvo estus granda konkero por la homaro, atendas tamen, ke ĝi estu altrudita de supre, anstataŭ lerni kaj uzi ĝin proprainciate. Kiuj diskonigas la lingvon havas nek ekonomikan nek politikan povojn, necesaj por movi la amaskomunikilojn. Sed la plej granda kulpo estas la aroganteco kaj mizera intereso de la plejaj povuloj, kaj de la pasiva konduto kaj submetiĝo de la ceteruloj» (p. 86).

Pro la aroj de dialogoj kaj interŝanĝoj oni taksus la verkon parte kiel romano de ekologia signo,

(1) Ĉe paĝoj 82-86 troviĝas mencio pri Esperanto kun argumentoj konataj kaj simplaj, sed tamen al la demando kial ne adopti nacian lingvon jam parolata de milionoj da personoj, la respondo estas trafa: internacia helplingvo devas utili por ke iu ajn persono, kvankam ne ĉeestinte la unuan lernejon, povu kompreni kaj paroli en iu ajn parto de la mondo, kiel li-ŝi estu en sia propra lando. Pro tio la lingvo devas esti ege facila por ke ĉiuj povu lerni ĝin. (p. 85).

Eksterteranoj ankaŭ scias pri Esperanto Johano Negrete


plena de denuncoj kontraŭ la detruo de arbaroj kaj malpurigado de aero, la du ĉefaj fontoj de la vivo en nia planedo, ĉar arboj malsekas la grundon. (2) Sed ankaŭ kiel socia romano, ĉar ĝi ankaŭ temas pri politiko, ekonomiko kaj ĝenerale kulturo (filozofio, religio, arto kaj teknologio).

Surprizas, ke estas unu sekcio dediĉita al la idearo de Simón Bolívar, definitiva kiel saĝulo, precipe en la kampo de politika pensado. (3)

Scienco kaj amo estas du ĉefaj ŝlosiloj de la vivo (4), kaj la kritiko al la ekonomia ordo estas sendube same akra kiel la politika. Pro tio ŝajnas, ke la aŭtoro emas al la ideo ke la aktuala modelo de produktado ne havas sencon, ĉar estas tute detruiga. Kaj oni eltiras la konkludon, ke se ne senreturne, almenaŭ iom malfruas por atingi savon de nia speco kaj planedo, kaj se oni ne rapidas agadi. (5) Tamen la fina mesaĝo estas optimisma rilate al tiu ebleco savi la vivon.

Laste kaj ne balaste. Iumomente la intereso fokusiĝas kaj la tensio kreskas ĉirkaŭ la deveno de niaj eksterteranoj. De kie ili venis? Jen la pinta intereso de niaj terloĝantoj. Ili venis de la planedo Marso! Do, ili estas marsianoj! Nur ke ili ruinigis aŭ elĉerpis sian planedon per “prograsa industria civilizacio”, sed, anstataŭ forlasi ĝin, decidis konstrui urbojn sub la surfaco de Marso! Ĉu “enmarsigitaj” urboj, anstataŭ “subteraj”? Tio memorigas min la ripetitan ŝercon de nia Komandanto-Prezidanto Hugo Chávez el Venezuelo, kiam li asertis, ke «probable kaŭzo de la ruiniĝo de Marso estis, ke tie ekzistis ankaŭ alia Internacia Mona Fonduso, samkiel la de nia Tero». Efektive, nia scienca kono pri Marso induktas konkludi jene: se ankoraŭ ne ekzistas indico de vivo sur la surfaco de Marso, ŝajnas probable, ke tie tamen

estis vivo kaj civilizacio ĉu kapitalisma I.M.F?, kaj fine ĝi turniĝis montinta planedo. Kurioza paradokso: kia inteligento estas tia, kiu povas eĉ mortigi planedojn! Demando sen respondo. Nur Dio scias, se Dio okupiĝas pri la universo.



(2) «Arboj ricevas rekte la sunradiojn kaj transformas ilin en oksigenon /.../. La arbaro favoras la ĉeeston de akvo sur la grundo kaj subgrundo por la homa subteno. Kun malapero de arbaroj la sunradioj atakas rekte la grundon, kaŭzante la vaporigon de akvo kaj laŭgradan dezertigon de nia surfaco» (pp. 42-43)

(3) «Bolívar estis unu el la grandaj saĝuloj de la homaro» (p. 29)

(4) «Per scienco kaj amo ĉiu komunumo de inteligentaj estuloj povas esti feliĉa» (p. 29.)

(5) «Se nur estus plantoj kaj bestoj sur la Tero, la vivo daŭros milionojn da jaroj. Kun la ekzistado de homo ne daŭros unu jarmilo plu» (p. 30).

Pri plurismo, nihilismo kaj budhismo

Ramón Morales Castel

Plurismo

Serĉante vorton en mia Nova PIVo miaj okuloj trafis hazarde la vorton plurismo. Ĝi havas du difinojn en la vortaro. La unua estas jene: "Doktrino, kiu supozas la universon konsistanta el multaj individuaj estaĵoj, reciproke sendependaj, substance siaspecaj". Tio estas ekzakte la kontraŭon de tio, kion filozofie asertas budhismo. Laŭ budhismo oni ja povas diri, ke ekzistas multaj individuaj estaĵoj en la universo, sed ili ne estas reciproke sendependaj nek substance siaspecaj. Laŭ budhismo, la individuaj estaĵoj estas precipe kaj esence reciproke dependaj kaj ne havas propran substancon (budhismo nomas tion ĉi lastan vakueco). La vortaro sendas nin al la vorto monismo: "Filozofia sistemo, reduktanta la diversecon de ĉiuj korpaj kaj animaj fenomenoj al unu baza principo". La tri ĉefaj religioj de okcidento (kristanismo, judismo, islamo) kaj ankaŭ hinduismo, la antikva religio reganta dum la vivo de la Budho Ŝakjamunio, estas plurismaj doktrinoj. Ili instruas ankaŭ ian monismon, ĉar laŭ tiuj religioj la esenco de la homo estas ia spirita monado. Mi serĉas do la vorton monado en la vortaro kaj trovas tiun difinon: "Ĉiu el la apartaj simplaj nedivideblaj substancoj, kiuj, laŭ la sistemo de Lejbnico, konsistigas la elementojn de ĉio en la universo". Sed mi supozas, ke ni povas uzi la vorton monado por paroli pri la substancaj spiritaj unuoj, kiujn kristanismo, judismo kaj islamo nomas animo/spirito. Hinduismo nomas tiun spiritan monadon atmo.

Do, mi volis esprimi ion. Budhismo ne instruas pri la neekzisto de la memo aŭ de la individuaj estaĵoj. Ĝi instruas pri la dependa nesubstanca karaktero de la memo, de la individua estaĵo. Alivorte, la individuo ja ekzistas, sed li ne estas sendependa de aliaj individuoj nek havas sian propran substancon. Se oni permesas min diri tion, budhismo estas kvazaŭ "malplurismo". Multo da tempo bezonis mi por kompreni la profundan malsamecon inter tiu kerna filozofia trajto de budhismo kaj la plurismo/monadismo de la diismaj religioj, ĉu orientaj ĉu okcidentaj.

Nihilismo

Jen alia interesa vorto. En la hispana lingvo, kelkaj vortaroj donas du malsamajn difinojn pri nihilismo. Unu difino temas pri la filozofia-politika movado iniciatita de la ruso Ivan Turgenev kaj la alia

difino temas pri la pli ellaborita koncepto de la germana filozofo Fridriĥ Niĉeo. Sed bedaŭrinde kun la paso de la tempo la du difinoj kunfandiĝis ĝis la rezulto, ke ambaŭ difinoj jam miksiĝas en la nuna uzo de la hispanlingva vorto. Mi supozas, ke tio okazis ankaŭ en aliaj lingvaj komunumoj, ĉar (ŝajne) Esperanto spegulas tiun miksiĝon en la difino de la Nova PIVo: "Doktrino, neanta ĉian kredon kaj malakceptanta ĉian regadon". La difino nihilisto 2 (tuj malsupre en la vortaro) rilatas al la nihilismo elpensita de Turgenev. Tamen la Niĉea koncepto estus pli precize tiel: Neado de ĉia vitala volo. Kiam mi pensas pri la Niĉea nihilismo, tiam daŭre alvenas al mia kapo la barbarismo "neniismo", kiun mi nenie trovis ankoraŭ en alia loko ol en mia propra menso. Kial mi iom rezistas la kundandiĝon de la du dininoj pri nihilismo? Ĉar la Niĉea termino ne temas senescepte kaj fundamente pri neado de kredo. Tute male, Niĉeo konsideris, ke ĉiu diisma religio estis nihilisma, ĉar en la diismaj religioj la homoj lernas neadi la vitalan volon. Li skribis: Nihilismo estas la volo de nenio, la volo al nenio. (Eble pro tio la vorto neniismo aperadas al mi...) Li konsideris kristanismon la plej disvolvita formo de nihilismo, kaj kristanismo estas kredo! Ekzistas do kunfandiĝo en la difinoj de nihilismo.

Mi legas nun la komentojn de Niĉeo pri budhismo en lia libro "La Antikristo". Li kompreneble ankaŭ konsideras budhismon kiel specon de nihilismo. Por li, nihilismo estas ĉiu formo de neado de niaj animalaj instinktoj. Sekve, laŭ tia ideo, ĉiu spiritualisma religio estas nihilismo. Mi ne konsentas kun tio, ĉar mi ne estas tiel darvinisma kiel Niĉeo, kvankam mi ja opinias, ke budhismo estas pli mojosa filozofie kaj pragmatike ol kristanismo. La percepto de Niĉeo pri budhismo eble estiĝis pro tio, ke la doktrino pri la vakueco de la fenomenoj kaj de la estaĵoj montriĝis al li kiel speco de "volo de nenio". Kaj eble ankaŭ la nirvano montriĝis al li kiel "volo al nenio" pro tio, ke nirvano signifas "estingiĝo". Oni erare pensas unuafoje, de la okcidenta vidpunkto (kiu ĉiam substrekas la gravecon de la memo), ke la "estingiĝo" temas pri la ĉesado de la memo, de la mio. Tiel nirvano erare sonas kvazaŭ ia "spirita memmorto", kio tute ne estas. Mi mem faris tiun eraron havi tiun miskomprenon pri la vorto nirvano jam de longa tempo.



Directorio de Asociaciones en América

El Movimiento Esperantista (la *Movado*) es muy amplio y diverso. En todo el mundo hay una gran variedad de clubes, organizaciones, asociaciones, editoriales, institutos, etc, dedicados a la difusión y el uso del idioma internacional Esperanto. Reunirlos todos en una lista es una gran tarea. En este directorio te mostramos las páginas oficiales de las principales asociaciones de Esperanto en América. Presta especial atención a las páginas y recursos de asociaciones en países de habla hispana, puesto que podrás aprovechar tu lengua materna (el español), para aprender Esperanto o para participar en los eventos y encuentros en todo el continente. Este directorio está todavía en elaboración e irá creciendo en los siguientes números de esta revista.

ESTADOS UNIDOS

- > Esperanto-USA: <http://www.esperanto-usa.org/>
- > La Esperanto-Societo de Vaŝingtono: <http://www.esperantodc.org/>
- > Esperanto Society of New York: <http://www.esperanto-nyc.org/>
- > Esperantic Studies Foundation: <http://esperantic.org/en/>

CANADÁ

- > Esperanto en Canadá: <http://www.esperanto.ca/>
- > Esperanto-Societo Kebekia: <http://www.esperanto.qc.ca/eo>
- > Boletín La Riverego: <http://www.esperanto.qc.ca/eo/riverego>

CUBA

- > Asociación Cubana de Esperanto: <http://www.esperanto.cult.cu/>
- > Radio Havano Kubo: <http://www.radiohc.cu/eo/>

VENEZUELA

- > Asociación Venezolana de Esperanto: <http://www.esperanto-venezuela.org/>
- > Cooperativa Esperanto-Amikaro: <http://esperanto-amikaro.org.ve/ttt/index.php/es/>

MÉXICO

- > Federación Mexicana de Esperanto: <http://esperanto-mexico.org/>
- > Revista Ni ĉiuj: <http://esperanto-mexico.org/es/nicxiuj>
- > Asociación Mexicana de Esperanto: http://meksikoesperanto.org/el_esperanto_en_mexico.html

BRASIL

- > Brazila Esperanto-Ligo: <http://esperanto.org.br/bel/>
- > Brazila Esperantista Junulara Organizo: <http://bejo.esperanto.org.br/>
- > Esperanto @ Brazilo (portugués): <http://esperanto.brazilo.org/wp2/>
- > Esperanto Ilustrado (portugués): <http://www.esperantoilustrado.blogspot.com.br/>
- > Esperanto Ilustrita (esperanto): <http://www.esperantoilustrita.blogspot.com.br/>
- > Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>
- > Esperanto-Asocio de San-Paŭlo: <http://easp.org.br/portal/>

COLOMBIA

- > Liga Colombiana de Esperanto: <http://www.ooocities.org/kolombio/>
- > Kolombia Esperanto-Ligo: <http://esperantokalio.blogspot.com/>

URUGUAY


- > Urugvaja Esperanto-Societo: <http://www.esperanto.org.uy/>

CHILE

- > Asociación Chilena de Esperanto: <http://esperanto.cl/>
- > Juventud Esperantista Chilena: <http://chejo.blogspot.com/>

ARGENTINA

- > Liga Argentina de Esperanto: <http://www.esperanto.org.ar/>
- > Blog de la Liga: <http://argentinaesperantoligo.blogspot.com.ar/>
- > Bonaera Esperanto-Asocio: <http://esperanto-bea.blogspot.com/>



Esperanto: Movimiento Internacional

El Movimiento Esperantista es un movimiento verdaderamente internacional, multicultural, que reúne en un solo esfuerzo muchas culturas, pueblos y naciones, sin discriminación de razas, idiomas, religiones o inclinaciones políticas. Esperanto significa idioma pero también significa cultura internacional, derechos humanos, democracia y justicia social. Todas las asociaciones y hablantes del idioma internacional tienen un centro común, la Asociación Universal de Esperanto, que organiza, entre otras cosas, los Congresos Universales de Esperanto que se llevan a cabo en una ciudad del mundo una vez cada año.

ASOCIACIÓN UNIVERSAL DE ESPERANTO y otras organizaciones esperantistas

Asociación Universal de Esperanto (UEA):
<http://www.uea.org/info/hispana.html>

UEA en Facebook:
<https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio>

Centro multilingüe sobre el Esperanto: <http://esperanto.net/>

Unión Europea de Esperanto: <http://www.europo.eu/eo/chefpagho>

Liga Internacional de Pedagogos Esperantistas:
<http://www.ilei-mondo.info/page.php?pid=65657697>

edukado.net: <http://edukado.net/>

Academia Internacional de las Ciencias San Marino:
<http://www.ais-sanmarino.org/index.html>

Asociación Mundial Anacional: <http://www.satesperanto.org/>

Academia de Esperanto: <http://www.akademio-de-esperanto.org/>

Periódicos y revistas en línea

Revista *Kontakto* (revista juvenil): <http://kontakto.tejo.org/>

Eŭropa Bulteno (Boletín de *Eŭropa Esperanto-Unio*):
<http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/>

La Ondo de Esperanto y editorial *Sezonoj*: <http://esperanto.org/Ondo/>

La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Le Monde diplomatique: <http://eo.mondediplo.com/>

La Esperanto-centro EVENTOJ: <http://www.eventoj.hu/>

La Esperanta Gazetejo: <http://www.gazetejo.org/gazetejo>

Ĉina Radio Internacia: <http://esperanto.cri.cn/>

El Popola Ĉinio (Desde la China del Pueblo):
<http://esperanto.china.org.cn/EL/EL/EIPopolaCxinio/>

Monato (actualidad, noticias y opinión): <http://monato.esperanto.be/>

Usona Esperantisto (Esperantista estadounidense):
<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

En España

Federación Española de Esperanto:
<http://www.esperanto.es/hef/>

Hispana Esperantista Junulara Societo:
<http://www.esperanto.es/hef/index.php/hejs>

Asociación Catalana de Esperanto:
<http://www.esperanto.cat/web/?lang=ca>

Kataluna Esperanto-Junularo: <http://esperanto.cat/kej/ca>

Kataluna Esperantisto (revista):
<http://www.esperanto.cat/web/Kataluna-Esperantisto?lang=ca>

Arunda Esperanto-klubo:
<http://esperantoarunda.blogspot.com/p/eventos-eventoj.html>

Asociación Andaluza de Esperanto:
<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/>

Radios y podcasts

Radio Vatikana (Ciudad Vaticano):
<http://www.radiovaticana.va/esp/index.asp>

Radio Havano Kubo (Cuba): <http://www.radiohc.cu/eo/>

Muzaiko (Internacional): <http://muzaiko.info/>

Peranto (Alemania): <http://members.aon.at/aldone/retradio/>

Pola retradio (Polonia): <http://pola-retradio.org/>

3ZZZ Radio en Esperanto (Australia):
<http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

Varsovia Vento (Polonia): <http://www.podkasto.net/>

Editoriales

Eldonejo Impeto: <http://impeto.trovu.com/>

Mondial: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

Flandra Esperanto-Ligo: <http://www.esperanto.be/fel/>

Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>

Eldona Esperanto-Societo: <http://www.algonet.se/~eldona/>

KAVA-PECH: <http://www.kava-pech.cz/index-esperanto.html>

Libros de la serie *Stafeto* de Juan Régulo Pérez:
<http://www.esperanto.be/fel/but/stafeto.php>

Feliĉan Novjaron 2014!



FOTO: RAMÓN MORALES GIL.

**Bonajn dezirojn de
Venezuela Esperanto-Asocio
por vi kaj ĉiuj viaj konatoj kaj amikoj!**



VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.
Telefonnumero: 58 0212 6629224.
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net



Revista oficial de la Asociación Venezolana de Esperanto.